

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 8 Eberswalde 1984- 09- 24

Pri la kunveno de la forstista laborgrupo okaze de seminario AEST'84

Je la 31a de aŭgusto 1984 ok anoj de nia fakgrupo kunsidis en la sindkata klubo en Brno por preparoli niajn aferojn. Kelktempe ankaŭ partoprenis Sergeo Pokrovskij el Novosibirsk, kiu trandonis salutojn de nia kunlaborantino Valentina Kovaleva. Ankaŭ s- ano Ingwart Ullrich sendis salutojn kaj informis, ke li jus finis la verkadon de esperantolingva artikolo pri la forstaranĝo en GDR. Ĉiu, kiu deziras ekzempleron de la 42 paĝa artikolo povas turni sin al s- ano Ullrich.

- Pri la prilaborado de proponitaj Esperanto- terminoj estas komunikita, ke ĝis nun la proponaj de la unuaj cent nocioj estas kunmetitaj kaj senditaj al la anoj de la malgrandá komisiono. Poste ni intencas trauscradoni la la terminojn kun difinoj al Esperanto- lingvisto, laŭ propono de s- ano Milan Svoboda al s- ro Piĉ.
- Kiel en la FI 6 sub la unua streko jam estis informita, ni uzas en la nuna etapo de nia laboro nur unu nocion, se ĉe germana vorto en la vortaro de Weck ekzistas signifoj, sencoj. Do la nevalidajn ekvivalentojn en la aliaj lingvoj oni devas ellasi, forstreki.
- La problemo de la konformeco de niaj nocioj kaj difinoj kun la "Multilingual Forestry Terminology" estis diskutita. La ĉefa malfacilaĝo ĝis nun estas la manko de tiu resp. de tiuj libroj ĉe la anoj de nia laborgrupo. La problemon ni certe solvos paŝon post paŝo tiel, ke post la verkado de la unua milo de terminoj la slipoj ricevos ankaŭ la numerojn de "Terminology."
- Pri la kompletigo de slipoj per anglalingvaj difinoj la ne germanlingvaj anoj opiniis, ke krom la esperantlingva versio la germana sufiĉas, ĉar en la forstscienco la germana lingvo havas kaŭze de la historia evoluo specialan rolon.
- La diskuto pri la propagando de nia laboro en naciaj kaj internaciaj fakrondaj kaj – publikaĝoj rezultis, ke ni atendu ĝis la finigo de la unua laboretao, kiam ekzistas la unua milo da slipoj.
- Kelkfoje ni ricvas tre difektitajn sendaĝojn da slipoj. Se vi ne havas solidajn kunvertojn, bonvolu ĉirkaŭi la slipojn per fadeno aŭ

Listo pri senditaj kaj ricevitaj slipoj

	send.	ricev.	send.	ricev.
Berger	172 199		200 258	
Danilin	272 327	272 327		
Hinz	56 258			
Järvsalu	259 306		272 327	
Kovalèva	272 327			
Marinov	272 327	271 327		
Maserov	200 306		272 327	
Muodry	107 171	parte	272 327	272 327
Pachter	200 258		272 327	
Oroszi	272 327	272 327		
Ribers	272 327	272 327		
Svoboda	259 306	parte	272 327	
Ullrich	272 327	272 327		
Váňa	272 327	272 327		